

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Aŭtunaj planoj

### Legokunsido reta (sept. 6, 19:30-, per retoservo Jitsi)

Oni preparolos impreson, leginte « ALa senco de musa vivo » de Aleksandra Watanuki.

### Prezento de spertoj (sept. 16, 13 :30- , en Esperanto-Muzeo Jokohama)

Oni prezentos sian sperton ĉi-jaran en Esperanto, por 5 ĝis 30 minutoj, kun aŭ sen helpo de komputila projekciado. Ni esperas aŭdi sperton de ĉi-jara UK en Tanzanio

### 3-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio (okt. 4-6, Jeonju, Koreio)

Ĝis nun 4 el niaj membroj efektive vizitos, kaj kelkaj sen vizito partoprenos/oferas.

## EL NIA MUZEO

### Donacitaj libroj kaj dokumentoj, el aliaj landoj

- De s-ino Audibert Kazue (el Francio, vizitinte la Muzeon en marto) : 8 libroj ofertitaj de s-ino Francine Schwartz, inkluzive de la libroj de ŝia patro Raymond Schwartz, fama aŭtoro.
- De ges-roj Dieter kaj Yoshie Kleemann (el Germanio, vizitinte ges-rojn Doi): diversajojn, inkluzive de la libroj antaŭ la Dua Mondomilito, lasitaj de la patro de Dieter, esperantisto.

## eĥoj el ZZZ


Koran dankon pro via regula sendado de Novaĵoj Tamtamas.

Tre interesis min vian artikolon pri sakuroj. La naturo ja atentigas nin pri la ŝanĝoj, sed ĉu ni kapablas audi kaj adekvate reagi? Amikajn salutojn, Franciska

## sezonvorto julia

### Somerumo (土用の虫干し) Okita Kazumi

En la periodo de somermezo (periodo de la 20-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto), oni tenas librojn, vestojn k.a. sub la suno aŭ kontraŭ la vento por eviti damaĝon de ŝimo kaj fiinsektoj. Estas bone fari tion en sekaj tagoj post kelke da kontinuaj belaj tagoj.



## La 131-a Legokunsido

En la 7a de junio 2024 okazis la 131-a legokunsido por libere elektitaj libroj. Partoprenis 5.

### “Lingvo Stilo Formo” de Kálmán Kalocsay - fundamenta strukturo de la lingvo Esperanto -

Mizro Iwaya

Tiu ĉi libro estis unue eldonita en 1931 en Budapeŝto. Due kaj trie en Oosako, Japanio, 30 jarojn post la unua eldono. Tiel klasika valoro estas ĝi. Ĉe la tria eldono la aŭtoro parte reviziis la enhavon alprenante novan tendencon de esperanta lingvouzo.

La enhavo estas studo kaj instrukcio pri esperanta lingvouzo: Esperanta Vortfarado, La evoluo de nia poezia lingvo, Sendemandaj Respondoj, Esperanta Rimo, Esperanta Elparolo, Esperanta ritmo, Klasika metriko en Esperanto kaj La mezepoka Esperanto. La unua “Esperanta Vortfarado” estas grava monumento de esperanta vortostrukturo. Ĝi klare analizas kunmetitajn vortojn de Esperanto. La leganto povas bone kompreni ĝian strukturon kaj praktike utiligi ĝin en sia ĉiutaga uzo. La enhavo poste eniris en “Plena Analiza Gramatiko”.

La tria “Sendemandaj Respondoj” estas grava lernomaterialo de la lingvo Esperanto. Zamenhof eldonis “Lingvaj Respondoj” jarojn antaŭe. Ĝi estis bona gvidilo de fruepoka Esperanto. Sed post dekoj da jaroj, laŭ la vastiĝo de esperantaj uzantoj, Kalocsay vidis ke nova gvidilo estas necesa por novaj esperantistoj. Tial li verkis novan gvidilon imitante la manieron de Zamenhof. Kalocsay estis aktiva aganto de Esperanto, precipe ĉefa redaktanto de “Literatura Mondo”. Do li vidis

kaj spertis multajn frazojn de veteranoj kaj komencantoj. Li elektis esencajn temojn kaj verkis artikolon kiel instrukcion al ili. Tial tiu ĉi estas praktike bona materialo por komencintaj esperantistoj.

La kvara “Esperanta ritmo” kaj la sesa “Esperanta ritmo” estas bona gvidilo por poetoj. Ili estis poste adoptitaj en “Parnasa Gvidlibro.” Do la aŭtoro estis pioniro ankaŭ en tiu ĉi kampo. Alia rimarkindaĵo estas ke lia stilo estas tre klara kaj glata. Li estis pli granda stilisto post Kabe. La leganto tute ne sentas stumblon. Tia flua kaj eleganta stilo estas malofte havebla en Esperanto. Mi ofte cerbumas kial la aŭtoro akiris tian majstran talenton. Certe ekzistas diversaj kialoj. Sed mi volas aldoni ke li apartenas al hungara nacio kun aziadevena lingvo. Ĉefaj aktivuloj de Esperanto apartenas al eŭropa kulturo. Tial ilia stilo estas ofte fremda al ni azianoj. Distinge de ili Kalocsay montras tre intiman stilon al ni.

Mi preterpasis la lastan artikolon “La mezepoka Esperanto.” Tiu ĉi estas frivola teksto pri iluzia antikvaĵo. Sed mi kredas ke tiu ĉi estas enkarneigo de la revo de la aŭtoro. La libro restis longe elĉerpita. Lastatempe mi aŭdis ke ĝia kvara eldono estis plenumita en Oosaka. Ĉiu agnoskas ĝian elstaran kvaliton. Mi ĝojas pro la nova entrepreno!

### « La Florejo » de Sadio, islamsociaj vivosaĝoj

Sibayama Zyun’iti

Estas tradukaĵo de persa poeto Sadio en la 13a jarcento, nome aro da mallongaj rakontoj siatempaj kaj admonoj, verkitaj en prozo plus poemoj – min mirigis, ke la poemoj estis ĉiam kun rimoj esperantaj. La libro fakte temas ne pri floroj (rozoj), sed kredeble pro la vivkonsiloj valoraj kiel karaj floroj. La moro kaj la socio alia, sed homeco, bonaj aŭ malbonaj, ja estas

komunaj tralande kaj traepoke. Cetere, islamaj terminoj kaj propraj nomoj estas abunde komentitaj, sed la esenco estas kaptebla sen tiuj komentoj.

La libro estas n-ro 60 en la Serio Oriento-Okcidento, kaj mi legis ĝin pruntinte el la librotenejo de la Serio en Esperanto-Muzeo Jokohama.

---



---

## Informoj

---



---

### Ekspozicio de Pentraĵo

Miyazaki Hideko

Mi ekspoziciis mian pentraĵon ĉe la Japana-Korea Amikeca Ekspozicio okazigita en Jokohama Civitana Galerio de la 11a ĝis la 16a de junio. La titolo de mia pentraĵo estas “Du maskoj”. Mi desegnis du maskojn de Japanio kaj Koreio en akvarelo.

Pasintjare mi ekspoziciis kupran presaĵon de “Esperanto-Muzeo Jokohama”. Ĉi tio estas la dua fojo por mi. Mi volas daŭre komuniki kun tiu ĉi grupo.



### Kantado de Noo

Miyazaki Hideko

La 25an de junio, mi prezentis Noo-kanton nomatan utajo ĉe la kunsido en dancstudio en Setagaya, Tokio.

Utajo estas kantado de la partoj de Noo, japana malnova dramo.

En ĉi tiu tago, mi kaj mia amikino kantis la kanton “Turu kame” (Gruo kaj testudo). Ambaŭ bestoj havas longan vivon, do ili havas la signifon de aŭguro. Ĉirkaŭ 30 homoj ĉeestis en la kunveno. Mi ĝojis ke mi povas kanti tie.



Miyazaki Hideko dekstre

---



---

## fabelo

---



---

### Gruo kaj krabo (1)

originalo de Akita Uzyaku, tradukita de Sibayama Zyun'iti

Noto: Akita Uzyaku (1883-1962) estas japana novelisto, fabelisto kaj esperantisto.

秋田雨雀原作「つるとかに」、柴山純一訳

Estis lageto ĉirkaŭita de kamparo en iama Hindujo. Tie loĝis multaj fiŝoj. Kelkdek milionoj da fiŝoj diversspeciaj loĝis tie. La lageto ne estis tre malproksime de montoj, nek proksime, tial estis bona kvanto da akvo. Ĉirkaŭ la lageto

estis aleo da bonkreskaj tilioj, kaj ties folioj speguliĝis en la akvosurfaco.

En Hindujo vivis de antikve multaj famaj filozofoj, kaj tiuj erudiciuloj por filozofiumi intelekto, ofte vizitis tiun ĉi lagobordon, kaj

sidadis por pluraj tagoj. Ankaŭ en la lando furoris muziko, kaj tial en vespero kun brila lunlumo, belaj viroj kaj virinoj ĉe tiu ĉi lagobordo ĝue muzikadis.

“Kiel feliĉaj ni estas.” ĉi tiel alparolis unu el la fiŝoj en la lageto suprennaĝis al la lagosurfaco kaj vorante in-sekteton, al alia fiŝo.

“Jes vere.” Tiel la alia fiŝo respondis svingante sian voston kaj daŭrigis: “Ja estas multaj fiŝoj en la mondo, sed neniu aliaj ol ni en tiu ĉi lageto devas esti tiel feliĉaj. Abundas io por manĝi, abundas akvo por esti malsoifa, ne ĉasate de balenoj aŭ ŝarkoj kiel en la ekstera maro. Ni nur povas tiel trankvile naĝi kaj manĝi ĉiutage.”

Kun tia diro, la fiŝo movis sian gracilan korpon kaj fornaĝis laŭ la etaj ondoj. La alia fiŝo mute sekvis ĝin. Malantaŭ ili elfontis dolĉa akvo, kaj tiu akvo disvastiĝis, iam malaperis sensone.

Birdetoj kantis sur tiliaj branĉoj, kaj foje trinkis akvon el la lageto, foje suben venis rande de kanoj por akvumi siajn flugilojn. Ĉiufoje tiam aro da malgrandaj fiŝoj, surprizite pro la movo de la kan-folioj, fornaĝis. Kiam ili atingis lokon ŝajne trankviligajn, ili eligis blankajn ŝaumojn el sia buŝo malfermitan al la ĉielo, kaj ripozadis...

Al tia ĉi lageto tamen alvenis tre granda malfeliĉo.

En Hindujo estas longa sezono sen pluvo. Sed fojfojaj subitaj pluvegoj lasas homojn, vegetaĝojn kaj ĉiujn aliajn vivaĵojn profunde spiri. Sed iun someron venis malsekego. Homoj preĝis al dioj por subita pluvego, sed eĉ guto ne falis. Oni elfosis ĉiujn putojn, eĉ radikojn de herboj aŭ arboj por akiri akvon, sed neniel venis akvo. Fine, eĉ kotan akvon, se akvo enestas, homoj akapare trinkis.

La paca lageto ne povis rezisti al tiu ĉi malsekego. Tiom multe da akvo iom post iom malpliigis kaj nur estis kota marĉo.

La fiŝoj ĝis tiam vigle naĝintaj devis klini la korpon kaj iradi sur marĉa ŝlimo kvazaŭ serpentoj. Karpidoj kaj karasidoj komence naĝis elektinte akvoplenan lokon, sed iom post iom fariĝis malfortaj laŭ la malmultiĝo de akvo, kaj mortis multaj montrinte sian etan blankan ventron supren.

Ĉiuj fiŝoj gepatraj aŭ fortikaj kuniĝis kaj ekkonsiliĝis;

“Ni aŭdis de antaŭe, ke estas malfeliĉegaj fiŝoj, kio tamen estis fremdega afero, tute for de ni. Sed en tia ĉi situacio ni devas kolekti saĝon.”

Tiel la plej aĝa fiŝo alrigardis ĉiujn kun zorgoplena vizaĝo. Tiam unu el la fiŝoj suprenrigardis la aĝulan fiŝon kaj diris; “Se ni restus senfaraĵ, ni devus morti sekigite. Nu, sinjorego, ĉu vi ne havas bonan ideon?”

“Ja, pri tio mi cerbumadas de lasta tempo... ni aĝuloj ne damaĝas nian morton, sed mi estas tre malĝoja vidi, ke la malgrandaj fiŝidoj tiel kaj tiel fariĝas mortaj.” – daŭrigis la aĝula fiŝo kun larmoj en la okuloj.

“Mi strebas elpensi kiel eliri el tiu ĉi lageto, sed ĉar ni redonis niajn krurojn kaj flugilojn al nia Prapatra Dio Indra, ni nek povas flugi nek paŝi, kaj ni ne havas rimedojn. Mi kredas je Dio de antaŭe, tial mi kredas, ke ni povas iel savi nin, la Dio nepre savos nin. Sed vidante ke ĉiutage niaj idoj mortadas, ni devus fari ion. Se vi havas ian ideon, diru tion senĝene!”

Tiam juna fiŝo viglavoĉe diris:

“Mi ne kredas je dio kiel faras vi maljunuloj. Inter fiŝoj estas iuj kun flugiloj, estas iuj kun kruroj, ĉu ne? Tio tamen ne gravas. Gravas nur tio, kion ni faru por nia sorto. La unua problemo estas, ĉu ni senmove atendu morton, ĉu ni eliru el tiu ĉi lageto kaj serĉi akvoplenan lageton ie. La mondo estas vasta. Mi aŭdis, ke estas granda lago kvindek mejlojn fore. Tie ni ĉiuj povos vivi feliĉaj. Estas granda eraro, ke la nun loĝata loko estas la plej feliĉiga loko por ni. Ĉu vi ne pensas tiel?”

La juna fiŝo tiel rigardis ĉirkaŭen kun brilantaj okuloj. Multaj fiŝoj estis ege impresitaj de la penso de tiu ĉi juna fiŝo, kaj movis sian voston aŭ naĝilojn. Maljuna fiŝo vidis tion, kaj diris en aĝula profundopensa tono; “Sed tamen, diru al mi, kiel vi eliru de ĉi tie.”

(daŭrigota)

